

# № 2018:3 (maj-jun)

## Anoncoj

Specials on sale in the online store; UEA elektigas al gvida rolo ĉe UN; "Decroxification" weekend coming up in Texas; Firmo serĉas flujajn parolantojn; Kiel enmovadigi Duolingo-lernantojn?

## Loke

Raporto pri PER-2018; Symposium on multilingualism at the UN; Church library in Pennsylvania

## Help preserve history

*de la redaktoro* • HOSS FIROOZNIJA

We need volunteer proofreaders. The task is technically and linguistically very simple (no knowledge of Esperanto is needed), and it will help preserve our history for future generations.

## Focus on Local Groups

*de la prezidanto* • FILIPO DORCAS

In our continuing effort to foster, support, and encourage local groups, Esperanto-USA is providing a system of regional coordinators and a resource specialist so that local groups can continue to get started and flourish.

## De la estraro

Raportoj de la Direktoroj kaj aliaj estraranoj.

## Vilĉjo HARRIS

*laŭdoj* • CHARLOTTE BURTON

Ĉi-monate ni laŭdas laboreman samideanon, kiu helpadas la movadon en Usono dum multaj jaroj.

## Dr. William Sol Benson, America's Original Esperantist

*historie* • KRISTY LOMMEN

Although many Esperantists are familiar with Dr. Benson's *Universala Esperanto Metodo*, little is remembered about the man himself. Despite a biographical void, Dr. Benson was one of the earliest and arguably most influential of Esperanto's advocates in America.

## Leterkesto

Helpu starigi bultenon por malliberuloj.

## Medaloj de mortinto

*enigmo-solvoj*

La solvo de nia pasintnumera enigmo.

## Malsata stomako orelon ne havas

*enigmoj* • DAĈJO RUTAN

La kadavro de S-ro Rigidog troviĝis je la oka vespere. Li kuŝis sur parkobenko, kun kuglo en la maldekstra tempio.

## Odo al viŝilo


*beletre* • BARRY FRIEDMAN

Ho, skrapgumo / Mi sentas min tre bonŝanca havi vin.

## Ju

*senintenca esperantaĵo* • STEVE EICHBLATT


Ju pli oni posedas, des pli oni avidas.



# Anoncoj

## On sale in the online store

- VERKARO KAJ TRADUKARO. A. Kerbel. \$25.00. Catalog#: VERO16. **Link** <<http://bit.ly/2EK5Mhy>>.
- LA ASOCIO. Ziko van Dijk. \$25.00. Catalog#: ASO001. **Link** <<http://bit.ly/2EJu1P>>.
- FRAKSENO IGDRASILO, LA. Alf Henrikson & Edward Lindahl. \$25.40. Catalog#: FRA003. **Link** <<http://bit.ly/2EJORLW>>.
- ELEKTITAJ POEMOJ DE BRAZILA ESPERANTA PARNASO. \$25.90. Catalog#: ELE010. **Link** <<http://bit.ly/2EKncux>>.
- LUDU KUN NI! VOL 1 (propedeŭtika lingvo-kurso por infanoj). Elisabeta Vilisics Formaggio. \$26.00. Catalog#: LUD002. **Link** <<http://bit.ly/2EK5PtL>>.
- 7000 TAGOJ EN SIBERIO. Karlo Ŝtajner. \$26.20. Catalog#: SEP005 **Link** <<http://bit.ly/2EH0xin>>.
- BONA ESPERO – IDEALO KAJ REALO. Roman Dobrzyński. \$26.30. Catalog#: BONO14. **Link** <<http://bit.ly/2EKku8j>>.
- EDUKO DANĜERA KAJ ALIAJ TEATRAĴOJ. Harold Brown. \$26.60. Catalog#: EDU002. **Link** <<http://bit.ly/2EKmQUJ>>.
- BILDOJ PRI NORDA LANDO KAJ ALIAJ RAKONTOJ. Sen Rodin. \$26.80. Catalog#: BIL005. **Link** <<http://bit.ly/2EKk69R>>.
- LADA TAMBURETO, LA. Günther Grass. \$26.90. Catalog#: LAD001. **Link** <<http://bit.ly/2EK0ToS>>.



- MEMORLIBRO. Tamás Gecsö (ed.). \$27.00. Catalog#: MEM002. **Link** <<http://bit.ly/2EJp0cc>>.
- SINJORO TADEO. Adam Mickiewicz. \$27.20. Catalog#: SIN002. **Link** <<http://bit.ly/2EKneJd>>.
- TAGLIBRO DE MIA FRATO. Chava Pressburger. \$27.70. Catalog#: TAG002. **Link** <<http://bit.ly/2EKnyrt>>.
- KAJ KIU PRAVAS. Eugene de Zilah. \$28.60. Catalog#: KAJ002. **Link** <<http://bit.ly/2EIE451>>.
- KAJ STAROS TRE ALTE... Trevor Steele. \$28.90. Catalog#: KAJ007. **Link** <<http://bit.ly/2EGZjnh>>.
- AVO BICIKLAS ĈIRKAŬ LA MONDO Zef Jégard. \$28.90. Catalog#: AVO002. **Link** <<http://bit.ly/2EJuMwt>>.

*Mendu de Esperanto-USA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530, aŭ rete.*

## UEA elektiĝis en gvidan neregistaran grupon ĉe UN

Rezulte de diplomaciaj elpaŝoj en Novjorko kaj Ĝenevo, UEA elektiĝis por trijara periodo en la estraron de internacia kunordiga grupo de neregistaraj organizoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj, konata per la mallongigo CoNGO (pron. “kongo”).



Pli formale *La Konferenco de NRO-oj en Konsultaj Rilatoj kun UN*, CoNGO funkcias kiel tegmenta asocio por pli ol 500 organizoj kiuj tenas konsultajn rilatojn kun ECOSOC, la Ekonomia kaj Socia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj. La celo de CoNGO estas faciligi la partoprenon de NRO-oj en la UN-sistemo kaj kunlabori kun UN por komunaj celoj, ekzemple la

Celoj por Daŭripova Evoluigo.

UEA jam delonge estas membro de CoNGO kaj partoprenas en ties kunvenoj kaj laborgrupoj. Lastatempe ĝi aparte aktivis en du komitatoj de CoNGO, pri paco (Vieno) kaj pri edukado (Novjorko), kaj krome akiris bonan reputacion en Ĝenevo pro siaj intervenoj en diskutoj pri homaj rajtoj. Surbaze de tiu longdaŭra kunlaboro, dum sia marta jarkunveno en Ĝenevo la membroj de CoNGO elektis UEA-on al sia estraro por la periodo 2018-2021.

Kiel estrarano de CoNGO, UEA kunlaboras kun 17 aliaj grandaj internaciaj NRO-oj, sub la gvido de prezidanto Liberato BAUTISTA, kiu laboras en Novjorko. Inter aliaj asocioj-estraranoj troviĝas Soka Gakkai Internacia, la Internacia Alianco de Virinoj, Soroptimist International, Internacia Humanista kaj Etika Unio, kaj Internacia Unio de Psikologia Scienco. La estraro kunvenas rotacie en Novjorko, Ĝenevo kaj Vieno, kie UEA estas reprezentata de, respektive, prof. Humphrey TONKIN, Stefano KELLER, kaj prof. Hans-Michael MAITZEN.

“Kunlaboro kun aliaj internaciaj asocioj estas grava elemento en la strategio de UEA pri Konsciigo,” komentas d-ro Mark FETTES, la Prezidanto de UEA. “Tio gajnas por ni amikojn, donas okazojn por trejni niajn aktivulojn, kaj malfermas pordojn al komunaj projektoj en kiuj Esperanto ludas gravan rolon. Mi gratulas niajn reprezentantojn, ke ili tiel bone preparis la vojon al ĉi tiu signifoplena atingo. Ni energie plukonstruos sur ĝi!”

## “Decroxification Weekend” in North Texas

Marku viajn kalendarojn. De vendredo, la 31-a de Aŭgusto je la 4-a ptm ĝis dimanĉo la 2-a de Septembro je la 6-a ptm, la Esperanto-Klubo de Norda Teksaso gastigos semajnfino en Esperantujo. Oni povas nomi ĝin “La Nekrokodila Semajnfino”, aŭ “La Senkrokodiliga semajnfino”.

Venu kaj ĝuu la okazon amuze en la hejmo de Phil kaj Beth DORCAS (Filipo kaj Elizabeto). Vendrede la



vespermanĝo estos “hazarda miksaĵo”. Se eble, alportu ion por kunhavi kun la grupo. Pretiĝu por tendumi en la domo. Litoj kaj sofoj nur iom haveblos. La kosto estos po \$20 por helpi repagi la koston al la kuiristoj. Se vi venos nur vendrede vespere kaj alportos ion por kunhavi, ne estos kosto por vi.

Ni babilados, ludos, kantos, legos, transpasos gramatikaĵojn kaj ĝuos grandan amikecon kune. Se ni havos sufiĉe da partoprenantoj, ni eĉ povus agordi la pianon, sed ne antaŭ ol ĝi bezonas agordadon.

Bonvolu sciigi nin per [filipo@grupoj.org](mailto:filipo@grupoj.org) se vi planas ĉeesti. Venu kaj ĝuu amuze! Ĉiuj estas bonvenaj.

— *Filipo DORCAS*

## Firmao serĉas fluajn parolantojn

La firmao *Lionbridge Global Services for Machine Intelligence* serĉas homojn kiuj parolas Esperanton je “preskaŭ-denaska” nivelo por partopreno en projekto krei parol-rekonan teĥnologion por Esperanto.



La tasko estos simple registri elparolon de diversaj frazoj kaj frazpartoj. Oni laboros en sia hejmo. Por partopreni oni devas havi almenaŭ 18 jarojn, retkonekton, kaj *Android*-aparaton aŭ alispecan komputilon kun TTT-legilo *Chrome*. (Bedaŭrinde ne eblas uzi iOS-aparatojn kiel *iPhone*.)

La tasko daŭros proksimume unu horon kaj partoprenintoj ricevos \$40. Por aliĝi, necesas unue **plenigi la anglalingvan aliĝilon**

<<https://fs30.formsite.com/LB2014/form264/index.html>>.

Por pli da informo pri Lionbridge, vizitu **la Lionbridge retejon** <<https://www.lionbridge.com/en-us/global-services-for-machine-intelligence>>.

## Kiel enmovadigi la Esperanto-lernantojn de Duolingo?

Pli ol 1.7 milionoj da homoj eklernis Esperanton per

Duolingo. Sed kie estas tiuj lernantoj? Multaj el ili eble rezignas pri la lernado pro multaj kaŭzoj, interalie, ĉar ili ne sukcesis starigi personan kontakton kaj amikecan rilaton kun esperantistoj en siaj loĝurboj.



Pro tio UEA fariĝis partnero de Duolingo. UEA helpas trovi evento-gastigantojn, kiuj jam bone konas Esperanton, kaj Duolingo prizorgos invitojn al tiaj lokaj eventoj por lernantoj, kiuj iom progresis en la Esperanto-kurso.

Gastigantoj estas volontuloj, kiuj organizas interesajn, agrablajn eventojn, kie Esperanto-

lernantoj de ĉiuj niveloj lernas kaj amuziĝas kune. La eventoj povas esti diversspecaj, ekzemple babiladaj rondoj, studgrupoj, ludaj aŭ muzikaj renkontiĝoj en via loka klubo aŭ kafejoj, aŭ promenadoj en urboj aŭ en naturo.


Ni jam komencis traduki la evento-retejon de Duolingo al Esperanto, por ke ĉiuj esperantistoj povu gastigi eventojn, diskonigi ilin per Duolingo kaj akcepti novajn lernantojn. En ĉi tiu unua, prova fazo ni precipe serĉas volontulojn, kiuj krom Esperanto regas la anglan aŭ la hispanan, la du nunajn kurslingvojn.

Se allogas vin la ideo organizi eventojn kaj gastigi novajn Esperanto-lernantojn per Duolingo, bonvolu kontakti Emilio CID [cid.emilio@gmail.com](mailto:cid.emilio@gmail.com).

— Emilio CID

## Vilĉjo HARRIS

laŭdoj • Charlotte BURTON



Ĉi-monate ni laŭdas laboreman samideanon, kiu helpadas la movadon en Usono dum multaj jaroj. Vilĉjo HARRIS estas la direktoro de la Centra Oficejo

de Esperanto-USA. Se vi sendis retroŝton al ni, petis informon, aŭ aĉetis libron de ni dum ĵusaj jaroj, estis Vilĉjo, kiu helpis vin. Li laboras multe por helpi ĉiujn ajn esperantistojn en Usono aŭ aliaj landoj nome de Esperanto-USA, kaj ja li helpas nin. Estas pro la laboro de Vilĉjo, ke la retbutiko havas tiom da specialaĵoj, kaj pro la laboro de Vilĉjo la estraro povas kontakti ĉiujn novajn membrojn.

Ne estas simpla laboro, kiun li faras. Kiel helpi kaj pluigi la movadon estonten kaj samtempe konservi la historion? Kiel helpi novajn membrojn kaj junulojn kun tiom da nova teknologio, kaj samtempe ankaŭ tiujn, kiuj jam estis membroj dum longa tempo? Kiel antaŭeniri sen forlasi iun ajn? Estas ja defio, sed Vilĉjo bonkore kaj kuraĝe prilaboras, kaj Esperantujo profitas.

Sen la sindonema laboro de Vilĉjo HARRIS, Esperantujo en Usono ne estus tiom forta, kiom ĝi nun estas. Li donas per sia laboro pli brilan estontecon por Esperantujo (kaj multe da helpo al ni esperantistoj).



# Loke

## Pri PER-2018



Ni havis dek tri partoprenantojn ĉe la Printempa Esperanto-Renkontiĝo (PER) en la Sudorienta Regiono de Esperanto-USA. PER okazis ĉe la konferenca centro *Valle Crucis* proksime al Boone, Norda Karolino, kiu estas kaŝita en la montoj. Sufiĉe proksima, por sperti ĝin, estas la hejmo de la universitato *Appalachian State University* en la urbocentro de Boone.

Bill MAXEY estis nia instruisto kaj lia programo estis tre interesa kun materialo de gramatiko ĝis poemoj kun interesaĵoj por ĉiuj. Estis libera tempo por ĝui la ĉirkaŭaĵojn kaj amikiĝi. La partoprenoj alvenis de Okcidenta Virginio, Marilando, Georgio, Teksaso, Tenesio kaj Norda Karolino. Ni ricevis taksadojn kaj la partoprenantoj indikis, ke ili ĝuis la programon. Ĉar ni estas kuraĝigata, ni rezervis pli grandan konstruaĵon por PER-2019, kiu okazos 26-28 Aprilo. Bonvolu marki vian kalendaron!

— Murray MERNER [mmmm0320@gmail.com](mailto:mmmm0320@gmail.com)

## Symposium on multilingualism at the UN

What can be done to promote multilingualism in the work of the United Nations? How would it make the UN more effective? These were questions raised at a recent symposium on multilingualism organized by the Study Group on Language and the UN.

In a wide-ranging discussion, UN personnel, diplomats, NGOs and academics were in broad agreement that, if the UN is to realize its mission to reach out to civil society, and if it is to engage in constructive dialogue with its various publics, it needs to address its language priorities in the field and find the resources to act on these priorities.

Among other organizations whose language policies were examined in the course of the symposium were ASEAN, the International Criminal Court, and the European Union. Some one hundred people attended the symposium. The Study Group plans to continue its work of sensitizing the United Nations to the importance of multilingualism. Stressing the need for two-way communication and echoing one of the slogans associated with the Sustainable Development Goals adopted by the General Assembly in 2015, Humphrey Tonkin, chair of the symposium, remarked, “We all know how to say ‘No one left behind’ in English, but can we say it in Twi, or Gujarati, or Guarani — languages of the people whom we are supposedly serving? And can we understand, or even hear, the left-behind when they speak to us?”

The symposium was sponsored by the Center for Applied Linguistics (Washington DC), Birkbeck University of London, the Center for Research and Documentation on World Language Problems and its journal *Language Problems & Language Planning*, the Universal Esperanto Association, and the Esperantic Studies Foundation. More information is available at the **Language and the UN website** <http://www.languageandtheun.org>.

## Eta komenco: Church Esperanto library in Pennsylvania



Mia nomo estas Donalddo McCULLOUGH. I asked for and received permission from my church (which is the Homestead Avenue United Methodist Church in Johnstown, Pennsylvania) to set up an Esperanto Library in the hope that it may lead to the formation of an Esperanto Club. Attached is a photo of the library so far.

— Donalddo McCULLOUGH

## Medaloj de mortinto

*enigmo-solvoj*



En nia lasta enigmo, *Medaloj de mortinto*, prof. Ŝibolet ĉeestis funebregon en la domo de la forpasinto, s-ro Idzorgant, kies kolekto de valoraj medaloj estis montrita en lia librejo. En salono apud la librejo okazis krio kaj tumulto; alkurinte, Ŝibolet vidis, ke viro portas svenintan junulinon – laŭdire la nevino de la mortinto.

Iel, Ŝibolet suspektis trukon. Kaj kiam li rapide kontrolis la librejon, li trovis tie viron, kiu provis ŝteli la medalojn!

Sed kio suspektigis profesoron Ŝibolet?

La plej frua solvinto – nia veterana detektivo Rafa NOGUERAS – tuj rimarkis la ŝlosilan detalon:

Profesoro Ŝibolet suspektis, ke la paro celis akapari la atenton de la ĉeestantaro por faciligi la ŝteladon de la altvaloraj medaloj, pro tio, ke la viro diris, ke la junulino estas la nevino de la mortinto.

Prave. Kaj la aserto de la viro gravas, ĉar komence de la rakonto ni eksciis alian gravan detalon pri la mortinto. Solvinto Roĝero BLAINE klarigas:

Nomi la virinon “nevino” de s-ro Idzorgant estis tuj suspektinde. Se ja Idzorgant estis tutviva fraŭlo kaj sola ido, li evidente ne havis fraton nek fratinojn, do kompreneble ankaŭ ne genevojn.

Ĝuste!

En la lotumado ĉi-foje gajnis solvintoj **Linda WALLACE** kaj **Briĉjo**; ili ricevos po \$5-rabaton de la retbutiko. Gratulon ankaŭ al solvintoj Rafa, Roĝero, kaj Ellen EDDY.

# Focus on Local Groups

de la prezidanto • Filipino DORCAS

**I**n our continuing effort to foster, support, and encourage local groups, Esperanto-USA is providing a system of regional coordinators and a resource specialist so that local groups can continue to get started and flourish. Toward that goal we have added Kyle Bailey as our resource person. Kyle has experience at the local group level and has also been involved with Amikumu, Duolingo Events, and Meetup.com.

If your local group is not taking advantage of these resources, please communicate within your local group and with your regional coordinator so that you can use more of the beneficial tools which are available. We are beginning to set up training on these tools, so stay tuned for communications from your regional coordinator. Note: If your regional coordinator needs assistance, or if that position is vacant in your region, please have a conversation within your region to provide a volunteer to help us out. This work is a cooperative effort. We have a good team in place, but we need to know where additional help is needed, and we need to know who will volunteer from your region for additional communications. Every local group should know who their regional coordinator is and what tools are available.

## Amikumu

This **app for your iPhone or Android cell phone** <<https://amikumu.com>> is great for locating and messaging Esperanto speakers in your area who also use Amikumu. It calculates the position of their cell phones and provides a list of them in order of distance from you, with the nearest Esperanto speaker at the top of the list. You can then exchange text messages with anybody on the list.

Amikumu is very handy for announcing club meetings and getting the word out regarding your local events. Amikumu is free. Try it out!

## Duolingo Events

If you register as a host for Duolingo events, you can

announce your club meetings with help from Duolingo Events. **Become a host for your local group** <<https://events.duolingo.com/>>. The application to become a host has several steps which include an online training event with a live trainer. The results will be beneficial to your local group because your local meeting will be announced via email to active Duolingo students registered in the Esperanto course.

We do not have direct contact with the hundreds of thousands of registered Esperanto students because of privacy issues. However, Duolingo will gladly announce Esperanto meetings for your local group to possibly hundreds of students in your area.

The other huge benefit of being a Duolingo host is our connection with other Duolingo hosts on the Duolingo chat site for hosts where ideas are freely exchanged. There are also tips on how to hold better meetings for language groups. Do not overlook the benefits of Duolingo Events for your club. Being a host for Duolingo Events is free.

## Meetup.com

Some people interested in languages use Meetup to find out where language clubs are meeting. This includes people interested in Esperanto. When you announce your club meeting in Meetup other interested parties will read the announcement.

Meetup is not free, but if your club cannot afford it, you can apply for funding for a limited time period. For more information contact Hans Becklin, our national Meetup coordinator. Email Hanso at [hebecklin@gmail.com](mailto:hebecklin@gmail.com). You can **register for an account online** <<https://www.meetup.com>>. Having an account is free, but being able to post announcements has a subscription charge. Thanks to the Esperantic Studies Foundation for their assistance with Meetup accounts.

## Zoom Online Meetings

**Zoom** <<https://zoom.us/>> is an online meeting

service, similar to Skype or Google Hangouts. However, the service is of much higher quality and has features suitable for Esperanto online events. Organizations use Zoom when an in-person meeting is not feasible. The Board of Directors of Esperanto-USA uses Zoom for its monthly meetings.

We recommend Zoom because it maintains connections better and the quality of the video and audio are better, especially when the Internet connection is not the best.

Regional coordinators can use Zoom for its meetings. Local groups in a region can use Zoom for inter-group meetings. There are a number of scenarios where Zoom is ideal. We welcome your ideas on how to use technology better.

Zoom is not free, but Esperanto-USA has access through our strong partnership with the **Esperantic Studies Foundation**

<<http://www.esperantic.org/>>. If you want to plan a Zoom online meeting, contact Chuck Mays, the executive director of ESF at [chuck.mays@esperantic.org](mailto:chuck.mays@esperantic.org). Provide your requested scheduling and the nature of the meeting.

Onward and Upward!



### Filipo DORCAS

Filipo estas prezidanto de Esperanto-USA. Li kaj lia edzino Elizabeto loĝas en Fort Worth, Teksaso.

[filipo@grupoj.org](mailto:filipo@grupoj.org)

## Helpu starigi bultenon por malliberuloj

leterkesto • Mark HAMME

Elkorajn salutojn de la esperantistoj/lernantoj de la federacia malliberejo en Tucson, Arizono. Mi estas 50-jara lingvisto, poeto/verkisto, filatelisto, membro de Esperanto-USA, kaj korespondanto. Mi publikigis mian unuan artikolon en *Dia Regno*, kaj mi ĵus kompletigis Esperantan tradukon de du poemoj, kiuj estas la tekstoj por infanlibroj. (Eble oni povus diri al mi, kiel publikigi la poemojn kaj/aŭ la infanlibrojn Esperante. Mia ilustranto faras sian laboron nun.) Mi estas ankaŭ la sola gvidanto de la internacia lingvo ĉi tie. Kvar lernas per la kurso *Hanako lernas Esperanton*, kaj aliulo lernas nur per la poŝtkurso, ĉar li ne povas ĉeesti la studojn. Mi ĝuas multe la korespondon kaj subtenon de multaj esperantistoj, kaj la lernantoj volos partopreni en la internacia komunumo.

Ni pensis pri formi grupon por malliberuloj kaj tiuj, kiuj volas subteni nin, aŭ kiuj scivolas pri nia situacio. Ekzistas esperantistaj malliberuloj en aliaj lokoj. Mi scias, ke ĉiu ricevos feliĉe bultenon kiu temas pri samideanaj malliberuloj.

Sed estas kelkaj obstakloj: Oni ne permesas, ke ni sendu leterojn al homoj en aliaj malliberejoj. Malmultaj el ni havas aliron al Interreto ĉi tie; ĝi estas ĝenerale nehavebla kaj multekosta. Do ni bezonos eksteran peranton por ricevi la artikolojn de la malliberuloj, enskani kaj aranĝi ilin, kaj dissendi la bultenon. Malliberuloj ĝenerale estas tre malriĉaj, do membrokotizo pagita por nemalliberulaj subtenantoj pagus la kostojn de la individuo, kiu helpas nin. Mi scias, ke ni havos la subtenon! Eble E-USA kaj UEA publikigos nian grupon malmultekoste aŭ senkoste.

Do, amikoj, bonvolu pensi pri kiu(j) povus esti nia(j) ekstera(j) peranto(j). Se vi volas subteni aŭ eble demandi al mi pri tiuj aferoj, bonvolu kontakti min ĉe:

Mark Hamme #33391-379  
U.S. Penitentiary  
P.O. Box 24550  
Tucson, AZ 85734



# Help preserve history

de la redaktoro • HOSS FIROOZNA

**L**ongtime readers may remember the announcement from years ago that I'd be digitizing back issues of the newsletter to add to our online archive. Unfortunately, the project proved much more difficult than expected. The biggest challenge was actually *finding* those back issues, even with the generous help of our members. (Special thanks are due to Ellen Eddy and Mary Hammersmith, who several years ago sent me a big boxful of their personal collections from the '70s and '80s.)

Earlier in 2018 I was able to fill the remaining gaps thanks to Bill Harris at the Central Office, and over the spring I finally finished scanning everything in.

Now begins the second stage: expanding the online archives. Starting with 2008 (previously the earliest year available) I've been gradually adding issues in reverse chronological order. So far I've made it as far back as the late '80s, and now it's time to pause for travel to summer *renkontiĝoj*. Earlier issues will be added in late summer and fall.

The issues added so far can all be viewed in our online archive, and there's also an RSS feed for keeping track of the future uploads.

You may notice that issues prior to 2008 are available in PDF form only. These PDF files are essentially just photographs of the printed page, created by a scanner. While PDF is great for archives, it would be nice to have some articles in text format (HTML) too. Text is much easier to search, can be read on a variety of devices (smartphones, screen readers for the blind, etc.) and is sharable in social media.

It isn't necessary to create text for everything, but my goal is to have the most historically significant articles in both text and PDF form. And for that, I need your help. Specifically, **I need proofreaders to compare computer-generated text files with their corresponding PDF images.** The task is technically and linguistically simple (no knowledge of Esperanto is needed), and it will help to preserve our history for future generations. If you're interested

in helping, please contact [bulteno@esperanto-usa.org](mailto:bulteno@esperanto-usa.org), and I'll send you instructions on how the process works. Thanks!



Legantoj de multaj jaroj eble memoras mian anoncon ciferigi malnovajn numerojn de la bulteno por aldoni al nia retarĥivo. Bedaŭrinde, la tasko montriĝis multe pli malfacila ol mi atendis. La ĉefa defio estis efektive *trovi* la malnovajn numerojn, eĉ kun la sindonema helpo de niaj membroj. (Aparte meritas laŭdojn Ellen EDDY kaj Mary HAMMERSMITH, kiuj antaŭ kelkaj jaroj sendis al mi skatolegon da siaj propraj ekzempleroj el la '70-aj kaj '80-aj jaroj.)

Pli frue en 2018 mi sukcesis ŝtopi la lastajn breĉojn helpe de Vilĉjo HARRIS en la Centra Oficejo, kaj en la printempo mi finfine enskanis ĉion.

Nun komenciĝas la sekva stadio: poioma pligrandigo de la reta arĥivo. Komencinte per 2008, (antaŭe la plej malnova jaro havebla) mi poiome aldonas numerojn en inversa ordo. Lastatempe mi atingis la '80-ajn jarojn, kaj nun paŭzas por foriri al someraj renkontiĝoj. Sekvos pli fruaj jaroj en malfrua somero kaj aŭtuno.

Ĉiuj numeroj jam aldonitaj estas libere haveblaj en nia reta arĥivo, kaj ekzistas ankaŭ retfluo (RSS) kiu anoncos estontajn alŝutojn.

Vi eble rimarkos, ke numeroj antaŭ 2008 haveblas nur en PDF-formo. La PDF-dosieroj estas esence fotoj de la presitaj folioj, kreitaj de skanilo. Kvankam PDF bone taŭgas por arĥivoj, estus preferinde havi iujn artikolojn en ankaŭ teksta (HTML-a) formo. Teksto estas pli facile serĉebla, legebla en diversspecaj aparatoj (poŝtelefonoj, ekranlegiloj por blinduloj, ktp), kaj dividebla per sociaj komunikiloj.

Ne necesas tekstigi ĉion, sed mia celo estas finfine tekstigi la plej historie gravajn artikolojn. Kaj por tio, mi petas vian helpon. Specife, **mi bezonas provlegantojn por kompari komputile rekonitajn tekstojn kun la respondaj PDF-bildoj.** La tasko estas teknike kaj lingve tre simpla

(efektive, eĉ ne necesas koni Esperanton), kaj ĝi helpas konservi nian historion por estontaj generacioj. Se vi volas helpi, bv. kontakti min ĉe [bulteno@esperanto-usa.org](mailto:bulteno@esperanto-usa.org), kaj mi sendos al vi pli da informo. Dankon!

## De la estraro

En ĉiu numero de *UE* ni petas la estraranojn iomete raporti lastatempajn farojn aŭ alimaniere komunikigi kun vi, la membraro. Ni bezonas ankaŭ vian partoprenon, karaj membroj, do bonvolu sendi al la redakcio viajn demandojn, proponojn aŭ eĉ plendojn por la estraro. Ni bonvenigas reagojn en aŭ Esperanto aŭ la angla, laŭ via prefero. La redakciaj adresoj troviĝas en la kolofono.

### Charlotte BURTON, Direktoro

Laŭ la nuna progreso, antaŭ ol vi legas ĉi tion, mi finis skribadon de malneto de nova lernolibro pri Esperanto: *Esperanto For All*. Mi intencas kunporti ĝin kun mi al NASK kaj la Landa Kongreso en Julio. Dum mi skribas ĉi tion, 14 el planita 18 ĉapitroj jam finiĝis, kaj la ceterajn kvar mi skribos dum la venontaj semajnoj. La lernejo, kie mi estas instruisto, ĵus finis sian jaron kaj komenciĝis la someraj ferioj, kaj mi uzos la liberan tempon por fini la malnetan lernolibron kaj pretigi por NASK kaj la kongreso. Vidu la **unuan malnetan ĉapitron** <<https://goo.gl/uDn7x9>>.



Plue, plaĉas al ni anonci, ke ni jam donis stipendiojn al pli ol tridek homoj por helpi ilin pri la kostoj ĉeesti NASK kaj/aŭ LK. Ni antaŭĝojas vidi vin tie dum Julio!

— Charlotte BURTON

### Paige FELDMANN, Direktoro



**Hoss FIROOZANIA**

Hoss redaktas la bultenon en sia hejmurbo de Roĉestro, Novjorkio. Liaj vortoj ne reprezentas la vidpunktojn de E-USA aŭ ties estraro; pri siaj opinioj kulpas nur li mem!

[hoss@lodestone.org](mailto:hoss@lodestone.org)

Many books have been marked down to \$3.00 in the online store as we slowly transition our stock to Amazon Fulfillment. The change to Amazon will help us reach a wider market of language enthusiasts around the world, and hopefully increase interest in Esperanto. Take advantage of the sale while you can; many books are selling quickly. If there is a title you cannot find on the Retbutiko, **visit our Amazon shop** <<https://www.amazon.com/shop/esperanto-usa>>.

— Paige FELDMANN

### Nikvo WOODS, Direktoro

Dum ni finpretigas la ĉi-jaran Landan Kongreson, mi ŝatus uzi ĉi tiun spacon por dankegi la aliajn anojn de la Loka Kongresa Komitato:



- Jordan KALILICH
- Ben SPEAKMON
- Janjo PACEJO
- Chuck MAYS
- kaj, kompreneble, nian sentiman prezidanton, Filipino DORCAS

sen viaj sperto kaj laboro, la tuta afero ne povus okazi, do dankegon!

— Nikvo WOODS



Skanebla "QR-kodo" por poŝtelefonoj, kiu kondukas al la ĉapitro.

# Dr. William Sol Benson, America's Original Esperantist

historie • Kristy LOMMEN



The pen-and-ink drawing of Dr. Benson that appears in his publications.

*"A great unquenchable desire, a strong will and concentration of purpose will accomplish anything. If you have not got it, cultivate it. Start now. My object in life is ESPERANTO, nothing else matters, and I am going to climb and push my understanding forward until it reaches the summit."*

— Dr. William Sol Benson, 1928

## Introduction

Most Esperantists have some degree of familiarity with Dr. Benson's master work, the culminating edition of his *Universala Esperanto Metodo*. Published in 1932, this remarkable book contains a fully illustrated Esperanto dictionary, more than two hundred stories, and a pronunciation key referencing a highly diverse group of more than forty world languages. But certainly its most notable feature is its collection of more than 10,000 illustrative drawings. Through them, Dr. Benson sought to teach Esperanto to *all* potential students, regardless of the overwhelming number of native languages spoken in their ranks. His eventual goal was to create a method to teach Esperanto through the universal language of pictures

rather than the comparatively limited written word — a goal that, if accomplished, would make his book uniquely useful to Esperanto teachers and students around the world.

But although many Esperantists, even today, are familiar with Dr. Benson's *Universala Esperanto Metodo*, little is remembered about the man himself. As of June 2018, for example, **his Wikipedia entry**

<https://en.wikipedia.org>

[/wiki/William\\_Sol\\_Benson](https://en.wikipedia.org/wiki/William_Sol_Benson) comprises just a handful of sentences, most focusing on his work in the Esperanto movement. Even his own publications, in their various incarnations, contain few clues about his life. Aside from a stark pen-and-ink drawing of Dr. Benson, they contain no personal information about the author. Despite this biographical void, Dr. Benson was certainly one of the earliest and arguably most influential of Esperanto's advocates in America.

## Early life in Kiev

We do know that the man who would become Dr. Benson was born in Kiev, Ukraine, then part of the Russian Empire. He was apparently the first son born to Samuel Chaskalevich (b. 1848) and his wife, Chaie Minkowsky. Although he consistently recorded his birthday as August 24, the exact *year* of his birth is less certain. In earlier documents, he reported fairly consistently that 1877 was his birth year. Later documents, however, suggest that as he aged, like many of us, he became a bit less consistent in reporting his birthdate — the earlier 1877 date is probably, therefore, the most accurate.





The first page of the *Unua Parto of Universala Esperanto Metodo*.

We know few specifics about the life led in Russia by the Chaskalevich Family in the last decades of the 19th Century; however, their American descendants have related a family story purporting that Benson's father Samuel Chaskalevich was a prominent tailor who worked on contract for the Czar, designing uniforms for the Russian military.<sup>1</sup> How Samuel could have accomplished this work from Moscow while raising a family — one that eventually consisted of at least five children — in Kiev is not addressed in the family legend. It is interesting to note, however, that an illustration on the very first page of the *Unua Parto of Universala Esperanto Metodo* consists of three panels that introduce the nouns *reĝo* (meaning "king," or "czar"), *tajloro* ("tailor"), and *soldato* ("soldier"), followed by panels that employ the three figures to introduce the verb *estas*. This could, of course, be mere coincidence; however, it's also possible that these drawings reflect the influence of Dr. Benson's earliest memories.

We can surmise with a bit more certainty that Dr. Benson's early life in Ukraine probably had a great deal in common with the life led a generation earlier by Esperanto's creator, the young Dr. L. L. Zamenhof, in nearby Poland. As young men, both were immersed in a linguistic melting pot of sorts. Like the

Zamenhof Family, the Chaskaleviches were "Russian" Jews who spoke Yiddish at home. In Kiev, they were certainly surrounded by speakers of Russian as well as a smaller number of speakers of Ukrainian — a language that struggled to maintain its own identity against the inundating tide of the Russian language (and despite being officially banned in the Russian Empire at that time). Based on the fact that communicating in America, once they arrived, did not appear to be an insurmountable challenge for the Chaskalevich children, there was probably some level of exposure to English as well.

Also, like Dr. Zamenhof, Benson too was destined to put aside his dreams of peace through a common second language in favor of a more practical medical career. We may never know if, as a boy, Dr. Benson ever had the chance to meet or correspond with Dr. Zamenhof; however, it has been reported that Benson first learned Esperanto as early as its second year of existence.<sup>2</sup> Dr. Benson would have been just eleven years old at that time and still living in Kiev, less than 400 miles from the Zamenhofs' home in Bialystok, Poland. Benson's early experiences in his homeland clearly sparked a passion for Esperanto that endured throughout his life.



William Benson (at right) with brother Ruben and Father Samuel Chaskalevich, c. 1905?

## Coming to America



During the earliest years of the 20th Century it was the custom of many immigrant families to send their oldest son to America, both to establish himself in the new country and to pave the way for the eventual arrival of additional family members. Such seems to have been the case in the Chaskalevich Family. Again there is some confusion about the exact date of this milestone, but it's fairly certain that Sol Chaskalevich (Benson's probable birth name) was still a teenager when he arrived at the Port of Baltimore. It was there that he was christened "William Benson," an Americanized name that he embraced from that point forward.<sup>3</sup> We don't know if there were any relatives or family friends to meet him on his arrival in the new country, but we do know that he immediately gravitated to New York City where he established himself for the next two decades.

As a young, single man newly arrived in a new country, young William Benson undoubtedly set about establishing some sort of household, education, and career for himself. Back home in Kiev, however, conditions were becoming increasingly chaotic as political and social unrest swept through the Russian Empire. By 1904, it appears that Benson's brother Rueben and at least one of his sisters had immigrated to America, but both of his parents and his remaining sister(s) were still in Kiev during the pogrom of 1905. That October, a mob took to the streets, proclaiming that, "All Russia's troubles stemmed from Jews and Socialists." In addition to more than ten million rubles' worth of property damage, approximately 100 Jews were massacred and at least 300 more were seriously injured.<sup>4</sup> The remaining Chaskalevich Family fled Kiev very soon afterward, arriving in New York Harbor on April 4, 1906.

Within just a few months of his parents' arrival, William Sol Benson applied for naturalization. He'd been in the United States more than the five years required to apply, and he may have felt that establishing himself as an American citizen would help him ease the way for his remaining family members as they began their adjustment to life in New York City. On his naturalization application documents, Benson, then in his late twenties, listed his occupation as "photographer."



Chaskalevich Siblings (including William Sol Benson, second from right), c. 1905?.

## The power of images

Away from the strife of his homeland, William Benson had been free to explore entirely new opportunities in his adopted country, and photography seems to have caught his attention almost immediately. It was an ideal time to develop a career in that emerging field. Eastman Kodak's inexpensive Brownie camera had been introduced at the turn of the century, putting cameras into the hands of amateur photography enthusiasts on a large scale for the first time ever. The first commercially available color film became available in 1907, and photography was being newly used to document social conditions (rather than being limited to stilted studio settings, as was often the case prior to the arrival of the 20th century). The publication in 1890 of Jacob Riis's *How the Other Half Lives: Studies Among the Tenements of New York* caused a sensation — not just in New York City, but across the country — as its photographs exposed the stark reality of New York tenement squalor for the first time and triggered major social reforms. Similarly, renowned photographer Lewis Hine was using his camera to document arriving immigrants at Ellis Island at the same time that Benson's various family members were immigrating — part of a virtual tide of eastern European emigrants that swept in during the first decade of the 20th century. Photography wasn't just a fad, Benson surely understood, but a powerful means of education and social reform. Over the next ten years Benson left a handful of documents listing his occupation variously as "photographer," "manufacturer of photo plates," and "camera maker."

It was undoubtedly during this period that Benson began to associate the idea of images as a nascent educational tool with his earlier passion for Esperanto.

It was also during this time that Benson established a family of his own. He married Mary Reisner<sup>5</sup> (also a native of Kiev), on March 19, 1908 in Manhattan. Mary gave birth to their only child, Flora Benson, in New York City two years later on March 12, 1910. The young family was living on East 10th Street in Manhattan at the time they celebrated Flora's first birthday in 1911; two weeks later the entire country was horrified when New York's Triangle Shirtwaist Factory caught fire, resulting in the deaths of 146 garment workers, many of them eastern European Jewish immigrants with backgrounds very similar to Benson's. The fire, the deadliest industrial accident in New York history, occurred less than a mile from the Benson home.

## A passion for Esperanto

Luckily, William Benson had not followed his father into a career as a tailor or endured the often inhumane treatment of workers in New York's garment district. His early interest in photography evidently helped him to instead finance an education in medicine. He was undoubtedly in school during the years just after his marriage, graduating from the Osteopathic School of Philadelphia in 1917. This milestone occurred at the same year that his early hero, Dr. L.L. Zamenhof, passed away in Poland — an event that perhaps re-energized Benson's nearly life-long interest in Esperanto. As Dr. Benson relocated his family to Newark, New Jersey, and set about establishing a medical practice there, he was concurrently working to create the materials that would comprise his first Esperanto text books. The earliest of these, *Practical Esperanto*, was published in 1925.




Graduation photo from Philadelphia Osteopathy School, c. 1917.

*Practical Esperanto* was a small, paperbound book, approximately five by seven inches, and consisted of about 80 pages. Unlike Benson's later works, it was clearly aimed solely at English speakers: all explanatory text was in English; even the book's title was in English. It was also a more traditional language primer in that it was largely text-based. And although *Practical Esperanto* contained a vast number of small illustrations, it was not always immediately evident how these drawings related to the accompanying text. Their inclusion at this stage of Benson's writing seemed to be merely experimental.

Despite the somewhat random nature of its illustrations, *Practical Esperanto* was the first text in which Benson published a number of illustrated tables that would become one of the hallmarks of his work in subsequent years. These tables usually contained a dozen drawings with an explanatory header at the top. They most often served to illustrate Esperanto prefixes or suffixes. In *Practical Esperanto*, the headers were written in English, but in his later publications these tables were reprinted with Esperanto headers. For example, the header for the table illustrating the suffix *in*, as it appeared in *Practical Esperanto*, read "Suffix 'IN' indicates FEMININE." In later publications, Benson clearly trusted his readers (and his method) enough to believe that the Esperanto header "*La uzado de la*

*sufkso 'IN'* could be readily understood by anyone studying the drawings that appeared beneath it.

Unfortunately, the artist who created the illustrations is unknown; he or she went uncredited in all of Benson's publications. Although Benson himself probably wasn't the artist, he almost certainly served as the model for several of the panels. The man featured in the illustrations for the *Numeraloj* grid, for example, is clearly Benson, an identification made all but certain by the presence of the same fashionable pince-nez glasses and the diminutive mustache that Benson is seen to sport in his author photo. It was also during this time that Benson's wife Mary passed away. He married his second wife Fannie Galinkin (the widow of Elias Cowan), and adopted her son Bernard (b. 1903), whom he helped to establish a career as a dentist.



An illustration from *Universala Esperanto Metodo* in which Benson himself was clearly the model.

[To be continued in our next issue —Ed.]

**Note:** The photos are from the collection of Benson descendant Eileen Kemp, used with permission.

1. As reported by Eileen Kirschner Kemp (granddaughter of Benson's sister Bertha Farbman) in a phone interview in 2011.
2. *American Esperantist Magazine*. Obituary published 1946.
3. Name information reported by Eileen Kirschner Kemp (granddaughter of Benson's sister Bertha Farbman) in a phone interview in 2011.
4. William C. Fuller, *The Foe Within: Fantasies of Treason and the End of Imperial Russia*, 2006.
5. Mary's maiden name was also reported as "Reisur" and "Reiner" in various historical vital records.



**Kristy LOMMEN**

Kristy is an alumna of NASK and taught an Esperanto course at her son's middle school in Auburn, Washington. She uses her genealogy research skills to document the Japanese community that thrived in her hometown prior to internment during World War II. Their stories can be found on her website, <http://AuburnPioneerCemetery.net>  
<<http://AuburnPioneerCemetery.net>>.

[klommen@msn.com](mailto:klommen@msn.com)

# Ju

*senintenca esperantaĵo* • Steve EICHBLATT

La jenan butikon fotis membro Steve EICHBLATT dum lastatempa vizito al Ĉinujo. Sendube la nomo aludas al la zamenhofa proverbo, "Ju pli oni posedas, des pli oni avidas."



# Malsata stomako orelon ne havas

enigmoj • Daĉjo RUTAN



**P**rofesoro Elija ŜIBOLET iris al la restoracio Belodoro kun sia konato Viola MIOZOTO por ĝui vespermanĝon. La ĉefkelnero ĵus kondukis ilin al tablo, kiam Ŝibolet menciis unu el siaj pasintaj krimsolvoj.

“Kono pri la homa konduto ofte klarigas la ŝajne mirigajn konkludojn de krimsolvanto. Taŭga ekzemplo estas la murdo de Adam RIGIDEG, aranĝita por aspekti kiel memmortigo”, li diris. “Ĉu vi volas la historion?”

Viola ridetis ĝentile kaj demandis, “Nu, ĉu ni unue mendu la vespermanĝon?”

Ŝibolet ridetis indulge kaj daŭrigis la rakonton. “La kadavro de S-ro Rigideg troviĝis je la oka vespere. Li kuŝis sur parkobenko, kun kuglo en la maldekstra tempio. Lia dekstra brako estis en gipsobandaĝo jam de kvar semajnoj kaj kuŝis sur lia sino. Lia

maldekstra mano tenis pistolon.”

“Elija, bonvolu. Mi tre malsatas.”

Ŝibolet ĉirkaŭrigardis. Ne vidante kelneron, li daŭrigis sian parolon. “Ĉe la krimloko mi konkludis, ke li mortis je la sepa. La enhavo de liaj poŝoj konvinkis min, ke la murdo okazis en lia banĉambro, kaj ke oni poste portis la kadavron al la parko.”

Viola suspiris iomete, malfaldis la blankan buŝtukon, kaj kunklakis la arĝentan manĝilaron. “Mirige”, ŝi diris senentuziasme.

“Tute ne. Ĉar mi konsciis, ke iu vestis Rigidegon post lia morto. Sekvis, do, ke li estis sen vesto antaŭe, kaj la horo sugestis vesperan banadon. Sangospuroj en la banejo konfirmis mian teorion. Nun vi demandu, kio estis en liaj poŝoj kiuj indikis murdon, kaj ne memmortigon.”

Kaŝe serĉante la kelneron, Viola diris, “Kio?”

“En la dekstra poŝo de lia pantalono estis kvin monbiletoj kaj kelkaj moneroj. En la maldekstra poŝo estis naztuko kaj cigareda fajrilo. Lia biletujo troviĝis en la poŝo ĉe la maldekstra kokso. Certe vi vidas, kiel la murdinto eraris.”

“Jes, kiam li faris la mortigon kun malplena stomako”, diris Viola, profunde trinkinte el sia akvoglaso. “Kiu povas klare pensi malsata? Mi rezignas.”

---

Ĉu ankaŭ vi rezignas? Se ne, bonvolu sendi **nur unu** solvon al redakcio (adresojn trovi en la kolofono) **antaŭ la 15-a de Aŭgusto**. Inter la solvintoj ni lotumos du \$5-rabatojn de la retbutiko.

---



# Odo al viŝilo

beletre • Barry FRIEDMAN



Ho, skrapgumo,

Mi sentas min tre bonŝanca havi vin.

Mi povas forviŝi ĉiujn miajn erarojn,

## Kolofono

Redaktoro / Editor: Hoss FIROOZANIA

**Kontaktu nin:** <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia  
CPU 271205, U. of Rochester  
Rochester NY 14627-1205  
United States of America

*Usona Esperantisto* estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Prefere sendu materialojn retpoŝte, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton de via vizaĝo. Kun ĉiuj aliaj fotoj bonvolu aldoni notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Se vi sendas materialojn poŝte, ni resendos ilin al vi se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

*Usona Esperantisto* estas uzebla laŭ la permesilo de Krea Komunumo BY-SA <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/2.0/deed.eu>>. Cetere ni petas, ke oni atendu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

kaj rekomenci de la ekkomenco.

Se mi devus vivi sen vi,

Mia papero baldaŭ pleniĝus per nigraj skribetaĉoj.

Vi konservas mian paperon bela kaj pura,

mian vivon enorda kaj organizita.

Ho, skrapgumo,

Kiel pura kaj solida vi estas.

Mi ne perdos vin ĝis via plej eta peceto estis uzita.



**Barry FRIEDMAN**

Barry estas esperantisto jam de preskaŭ 20 jaroj. Li ŝatas basbalon, lingvojn, kaj manĝi pasto-ringojn.

[bfriedma@chemistry.ohio-state.edu](mailto:bfriedma@chemistry.ohio-state.edu)

Kontribuontoj eble volus legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en nia retpaĝaro.



*Usona Esperantisto* (“American Esperantist”) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English. Please send materials by email if possible and include your name, your address, and a head shot. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. If you send materials by mail, we will return them to you if you include a self-addressed, stamped envelope.

*Usona Esperantisto* is made available under the Creative Commons Attribution-Share Alike license BY-SA <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>>. As a courtesy, we additionally ask that you also wait two months before reprinting the latest content.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors may want to consult the submission calendar and style guide on our website.